

NOVEMBRO 2008

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2008:5-6

LITERATURAJ PAĜOJ 11-15



Oranĝa renkontiĝo kaj librofoiro Apelsinträff och bokmessa

En la neformala Oranĝa renkontiĝo en Hernusando dudeko da esperantistoj uzis Esperanton diversmaniere dum kelkaj tagoj (p. 5).

En la librofoiro en Gotenburgo Folke Wedlin prelegis pri Esperanto kaj esperantistoj informis pri la lingvo (p. 3).

På den informella apelsinträffen i Härnösand använde ett tjugotal esperantister Esperanto under några dagar (sid. 5).

På bokmässan i Göteborg föreläste Folke Wedlin om esperanto och några esperantister informerade om språket.

Foto: *supre/ovan: Janko Luin, maldekstre/till vänster: Anita Dagmarsdotter*

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Novembro 2008 • 96-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: esperanto@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2009: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2008:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@glocalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Per-Aarne Fritzon



Kie vi naskiĝis?

En Stokholmo antaŭ 45 jaroj.

Kie vi loĝas?

Daŭre en Stokholmo - aŭ denove, ĉar en la aĝo inter 4 kaj 9 mi vivis en Helsinko, Finnlando, la devenlando de mia patrino.

Pri kio vi laboras?

Mi estas ĵurnalisti kaj de 10 jaroj okupiĝas pri paĝaranĝado ĉe Lokaltidningen Mitt i, kiu estas grupo de 30 senpagaj lokaj novaĵgazetoj en la stokholma regiono.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Mi apenaŭ trovas tempon por ŝat-okupoj, sed mi tre ŝatas legi, lastatempe ial plejparte biografiojn. Kiam mi povas, mi ankaŭ volonte umas per komputiloj, ekzemple muntante hejmajn videofilmojn aŭ kreante malgrandajn programojn por raciigi diversajn taskojn.

Ĉu vi havas familion?

Jes! Mian edzinon Lena mi fakte renkontis pere de Esperanto. Nia 7-jara filino Minna ĵus komencis la unuan klason de la lernejo.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Mi legis pri ĝi jam kiel infano kaj kaptiĝis de la ideo, sed ne konis aliajn interesatojn. Aŭtune en 1979, kiam mi havis 16 jarojn, oni en la strato subite enmanigis al mi flugfoliojn pri senkosta Esperanto-kurso en la stokholma Laborista klubo. La disdoninto estis la konata aktivulo Pelle Persson kaj sub lia inspira gvido mi rapide eniris la lingvon. Do mi povis jam la sekvan

someron profite partopreni en la oportune lokita Stokholma UK de 1980!

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Nuntempe ne, sed inter la jaroj 1980 kaj 1995 mi estis tre organize aktiva. Dum longaj periodoj mi estis estrarano de SEJU kaj SEF. Unu jaron mi laboris kiel pagita dungito en la stokholma Esperanto-Centro. Kelkajn jarojn mi estis redaktoro de La Espero kaj ankaŭ de la tutnordia junulara bulteno Kvinpinto. Tre multe mi engaĝiĝis en la stokholma klubo La Ranetoj kaj en la tri unuaj Kulturaj Esperanto-Festivaloj. Tiuj projektoj estis kvazaŭ miaj infanoj, ĉar ambaŭ - la klubo kaj la KEF-koncepto - fakte originis de proponoj miaj, lanĉitaj en momentoj de inspiro!

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Pripensinte mi konstatas, ke la libroj plej ofte relegitaj tra la jaroj estas la diversaj eseoj de Waringhien. Mi ankaŭ tre aprezas la krimromanojn de Sten Johansson, kiuj kun escepta sukceso uzas Esperanton por priskribi la realan mondon.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Kiel dungito en la grafika firmao de Franko Luin mi siatempe dum tri jaroj havis la privilegion labori en entrepreno, kie la iutaga interna laborlingvo estis nur Esperanto! Kaj kiu kredus nun, ke mi iam instruis nian lingvon al du komencantoj, kiuj poste vere famiĝis en Esperantujo: la akademiano Bertilo Wennergren kaj la kantverkisto Martin Wiese ...

Cetere, vizitu min ĉe <http://www.ipernity.com/doc/fritzon/2738434>

Intervjuis: Leif Nordenstorm

Karaj legantoj!

Post kelksemajna laboro mi nun povas prezenti duoblan numeron de La Espero.

Espereble vi povas uzi la jarfinajn feriojn por legi la literaturaĵojn en la numero.

Mi deziras al vi bonajn festotatojn!

Via redaktoro

En la librofoiro en Gotenburgo...

Sveda Esperanto-Federacio partoprenis en la librofoiro en Gotenburgo kune kun Eldona Societo Esperanto.

La foiro okazis 25-28 Septembro en Gotenburgo en Svenska Mässan, do en la sama ejo kie okazis Universala Kongreso de Esperanto en 2003. Tamen la librofoiro estas multe pli granda aranĝo. Ĝi havis 100.000 vizitantojn, el kiuj duono venis el la regiono ĉirkaŭ Göteborg, kaj la aliaj el la cetera Svedio kaj ankaŭ el eksterlando. El la vizitantoj ĉe Bok & Bibliotek, duono estas instruistoj aŭ bibliotekistoj, la statistiko kiun la organizantoj faris dum la ĉi-jara foiro. ĉefe libroeldonejoj havas budojn en tiu ĉi foiro, sed ankaŭ multaj aliaj.

La ekspozicio pri esperanto okazis en la "internacia foiro". Esperantistoj el Gotenburgo faris grandan laboron pri la foiro.

Ili raportis ke ili havis multajn ŝancojn rakonti pri Esperanto al vizitantoj. Tamen nur malmultaj libroj vendiĝis, ĉar la eblecoj aĉeti librojn estis multegaj.

Tute nova eldonaĵo estis la tria eldono de "Esperanto! Nyckel till det internationella språket", kiu bone vendiĝis, pro sia malalta prezo.

Folke Wedlin prelegis pri Esperanto sur la malgranda scenejo. Aŭskultis ĉirkaŭ 25 aŭskultantoj.



La Esperanto-budo en la librofoiro. Fotis: Anita Dagmarsdotter

kaj en Eŭropa Socia Forumo en Malmö

Sveda Esperanto-Federacio (SEF) kune kun Dana Esperanto-Asocio (DEA) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) partoprenis en Eŭropa Socia Forumo en Malmö la 17-an ĝis la 21-a de septembro.

Ni havis informtablon kun broŝuroj en diversaj lingvoj, la sveda, angla, itala, hispana, nederlanda, greka. Krome ni cirkulis inter la budoj, tendoj kaj seminarejoj, disdonante varbfolietojn por nia sabata seminario kaj la okazanta distanckurso pere de Kvarnby Folkhögskola.


Nia seminario sabate matene "Interkulturell dialog på lika villkor i en global värld" (anoncita ankaŭ en la angla) allogis ne tro multajn aŭskultantojn. Sean O'Riain en la angla interese prilumis kelkajn problemojn kaj malavantaĝojn de la nuna lingva situacio en Eŭropo kaj Lars Forsman donis etan lecionon de Esperanto pere de la rekta metodo kaj multaj desegnaĵoj.

Sabate posttagmeze ni partoprenis en la granda parado de Rosengård, tra tuta Malmö ĝis Baltiska Hallen en Pildamsparken. Estis plurhora promenado kune kun proksimume 15.000 aliaj homoj de plej diversaj organizoj kaj grupiĝoj.

La eventualan rezulton de nia partopreno en la Forumo oni ne tuj povas taksi. Eble ni vekis intereson ĉe iuj personoj - semoj, kiuj iam ekkreskos ...

Ann-Louise Åkerlund

Per-Olof ĉe nia informtablo.
Fotis: Ann-Louise Åkerlund



En la retejo de Kvarnby Popolaltlernejo vi nun povas ricevi informojn pri la planita distanckurso dum la aŭtuno 2008.

www.kvarnby.fhsk.se

Esperanto-kurs på Stockholms universitet



Är du intresserad av internationella kontakter?
 Är du öppen för nya idéer och lösningar?
 Är du allmänt språkintresserad?
 Är du bosatt i Stockholm? (Eller gillar distanskurser?)
 I så fall kanske du vill anmäla dig till:

Grundkurs i esperanto, 30 hp

Esperanto är ett konstruerat internationellt språk. Det är det konstruerade språk som har flest användningsområden och den största spridningen världen över. Uppgifterna om antalet talare varierar bl a beroende på vilken kompetensnivå som avses, men det finns tillräckligt många för att man ska kunna ha glädje av språket på flera olika sätt. Utbildningen i esperanto vid Institutionen för lingvistik på Stockholms universitet är till stora delar internetbaserad (www.lernu.net). Syftet med kursen är främst att ge praktiska färdigheter i esperanto, men även att ge teoretiska kunskaper om mellanfolkliga och konstruerade språk i allmänhet.

VT 2009 – HT 2009

Studieform: Normal/Distans

Studietakt: 50%

Ort: Stockholm

Studietid: Kväll

Behörighet: Grundläggande behörighet.

Anmälan: Anmälan sker på www.studera.nu t.o.m. 23/12

Frågor: Skriv till sonja@ikso.net

Bonvenon! / Välkommen!

Debattartikel i VF

"EU-invånarna på mellanfolklig nivå behöver en gemensam nämnare för att känna tillhörighet med övriga EU-invånare. Esperanto skulle kunna fungera som denna byggsten, skriver Lennart Svensson, ansvarig för Esperanto-Gården i Lesjöfors med anledning av den Europeiska språkdagen.

Debattartikeln publicerades som en helsida i Värmlands folkblad 2 oktober. Hälften av sidan syns här till höger.

Det är alltså inte utsiktslöst att debattera om språkfrågor och esperanto.



TRA LA LANDO

Upplands Väsby på Internet

I sju år gav Esperanto i Väsby ut tidningen "La Hirundo" på esperanto. Därefter gav man ut "Språket Esperanto" på svenska och nu tar man steget över till Internet. Man slipper dyra distributionskostnader och alla som vill får informationen helt gratis.

Alla som vill prenumerera på "Kulturforum Esperanto" kommer att få information om mässor, utställningar och andra arrangemang, litteratur och kultur, utkomna böcker, film, radioprogram och TV, esperantos historia.

Kulturforum Esperanto skall komma ut en gång per månad eller oftare. Vill du ha den i din e-postlåda, hör av dig till kulturforum@esperanto.se

Esperantomusik på P1

Utbildningsradion sände torsdagen den 18 september kl 21.03 ett halvtimmes samtal med musikgruppen "La Perdita Generacio", som sjunger på esperanto, med musikinslag som prov på gruppens sånger. "La Perdita Generacio" har sin bas i Härnösand, och har medlemmar utspridda i Sverige och kontakter långt över gränserna.

Ulla Luin

Europeiska språkdagen



Den 26 september firades den Europeiska språkdagen bland annat i Serieteket i Kulturhuset i Stockholm. Esperantoförbundet fanns på plats och delade ut information om esperanto och svarade på frågor från intresserade besökare. På bilden: Einar Faanes och Olof Pettersson. Foto: Ulla Luin.

Debatt på TV

Är esperanto lösningen för EU? Var rubriken för ett teveprogram från Utbildningsradion.

Det finns 27 EU-länder, och vi talar 23 olika officiella språk inom unionen. Man kan ju fråga sig hur vi ska kunna känna riktig gemenskap! En väg till större gemenskap kan vara språket esperanto. Det tycker i alla fall många av dem som talar esperanto idag.

Programmet visades på UR den 21 sept och Sonja Petrovic Lundberg som undervisar i esperanto på Stockholms Universitet och Bengt Samuelsson från EU-kommissionen var gäster. Dessutom sjöng och spelade Martin Weise låten Pli Ol Nenio (Mer än ingenting)..

Artikel i Språktidningen

I oktobernumret (nr 5-08) av Språktidningen finns en tre sidor lång intervju med Janko Luin, Ulla Luin och Esperantoförbundets ordförande Bengt-Olof Åradsson. I samma nummer finns också en helsidesartikel om esperantorock och länkar till sidor med esperantomusik.

TRA LA LANDO

Informado ankaŭ en Skolforum

Skolforum en Stockholm okazis en Älvsjömässan, 27-29 oktobro. En tiu foiro, la kvar plej grandaj ekspoziciantoj estis la grandaj svedaj eldonejoj por lernolibroj (Liber, Bonniers, Gleerups, Natur&Kultur), krome aro da aliaj eldonejoj de lernolibroj, kelkaj lernejoj aŭtoritatoj, kelkaj revuoj por instruista merkato kiel Språktidningen. liber-volaj organizaĵoj kiel la UN-asocio (FN-förbundet) havis budojn, kaj je unu vico da budoj estis aro da prezentoj de la plej nova tekniko pri elektronikaj vand-tabuloj. Je kvar malfermaj prelego-"placoj" okazis 20-minutaj prelegoj pri diversaj lernejoj temoj. La esperanto-budo estis formale organizita de Esperanto-Gården ĉi-foje, sed kiel kutime, Roland Lindblom faris la laboron prepari, aranĝi financigon, transporti, aranĝi helpantojn. Kune kun helpantoj li mem deĵoris en la budo.

Ulla Luin



Supre: Nicoline Kinch estis unu el la informantoj en la esperanto-budo ĉe Skolforum, oktobro 2008 en Stockholm. Je la malantaŭo videblas Roland Lindblom, kiu aranĝis la budon. (Fotis: Ulla Luin)
Malsupre: Informado en Södertälje. (Nekonatulo fotis.)



Rotario helpas Bonan Esperon

La Rotaria klubo de Boden dum la laborjaro 2008-2009 mone subtenos la infanejon "Bona Espero" en Alto Paraiso en Brazilo. Bona Espero estas infanejo por i.a. georfoj, kie la infanoj kaj studas kaj lernas terkulturadon. La infanejo estis fondita de esperantistoj kaj en ĝi volontulas esperantistoj. Tial multaj el la infanoj bone regas Esperanton.

La prezidanto de la Rotaria klubo de Boden nomiĝas Leif Nordenstorm kaj estas esperantisto.

Ekspozicio en Södertälje

ABF aranĝis malfermajn tagojn por prezenti sian aŭtunan kurs-programon. Samtempe ABF invitis diversajn societojn, do ankaŭ la Esperantoklubon de Stockholm, montri sian aktivecon publike kaj tiel varbi kurs-partoprenantojn.

Laŭdinde. Krom afabla eĉ ĉarma akcepto de la aranĝuloj ABF ankaŭ pagis rektajn kostojn por nia agado.

Ni ricevis favoran lokon en granda salono inter bunta rondo de aliaj bonhumoraj ekspoziciistoj.

Nia prezentado konsistis de kvar partoj. -- Freŝaj kaj aktualaj tabuloj Tablo kun kolekto da libroj kaj gazetoj el vasta kampo. Ni projekciis esperantlingvan ukrainan natur-filmon grandformate sur blanka muro. Ni aranĝis provlecionon. Ni ankaŭ invitis vizitantojn aŭskulti sonbendon kaj samtempe legi tekston. Temis pri parolo de Ivo Lapenna (Fundamento) kaj kanto de Damjanov (Mia kolekto).

Oni devas prijuĝi la tutan eventon kiel bona.

Siriana TV-grupo filmis la tutan salanon kaj pro tio ni supozeble aperos tutmonde.

**Kerstin Rohdin, Gunvor S.
kaj Hans D.**

Distanca kurso en Skanio

Kvin gelearnantoj studas esperanton ĉe Kvarnby Popola Altlernejo en Malmö helpe de programo First Class. Ili sekvas la studplanon,

konstruita de Sonja kaj Hakan Lundberg por la universitato de Stokholmo, kaj uzas la kursojn de lernu!

Ann-Louise Åkerlund

Informado en Viksäng

La 30an de aŭgusto okazis "Viksängsdraget" en la urboparto Viksäng de la muzikmetropolo Västerås. Tio estas ia jarfoiro kun amuzejoj por infanoj, brokantejoj, viva muziko de lokaj junulargrupoj, "seriozaj" organizaĵoj kaj entreprenoj. Västerås Esperantoklubo estas membro de tiu ombrel-organizaĵo kiu helpas nin per senpagaj anoncoj ktp. Vi vidas nian tablon kun informoj kaj la tabulon sur kiu ni memorigas vin pri la 2 koncertoj kiuj okazis en la konsertdomo.

Wim Posthuma

Lernejoj tagoj en Malmö

Dum tri tagoj ni provis interesi preterpasantojn kaj aliajn ekspoziciantojn pri La Internacia Lingvo. Kiel kutime, la plej ofta demando inter tiuj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri Esperanto estis: Kiom da homoj parolas ĝin?

Sufiĉe multaj iam renkontis Esperanton, pere de parenco, konato aŭ najbaro, kelkaj iomete mem lernis in antaŭ multaj jaroj. Virino el Pollando eĉ instruis Esperanton en la hejmlando sed post sia transloĝiĝo al Svedio ne renkontis esperantistojn. Ilia plej ofta demando estis: Ĉu ĝi ankoraŭ vivas?

Ni transdonis informfoliojn kaj la informnumeron de La Espero, montris lernomaterialojn kaj interesajn librojn, invitis al semajnfina kurso en Malmö kaj instigis ilin viziti la hejma ojn de Lernu!

Laŭ informfolioj de la foiraj aranĝantoj la nombro de vizitantoj estis lunde 2.131 kaj marde 2.714.

Ann-Louise



Oranĝa renkontiĝo

*Dekstre:
Ŝakludado dum
Oranĝa renkontiĝo
Sube:
Kvieta ripozado
dum Oranĝa
renkontiĝo
Fotis: Robin
Rönnlund*

Denove en Härnösand en la sama grandbieno ĉirkaŭita de bela naturo okazis inter la 5-a kaj 7-a de septembro la Oranĝa Renkontiĝo. Krom la svedoj partoprenis du danoj, unu germano kaj unu ukrainano. La eksterlandanoj kaj multaj el la aliaj partoprenintoj estis novaj por tiu ĉi jaro, kaj la aranĝo krom spertajn esperantistojn ankaŭ allogis komencantojn. Krom la tranoktintoj ankaŭ ĉeestis pliaj homoj ĉe la koncerto de Perdita Generacio vendrede vespere ĝuste kiel lastjare, kaj la sekvan vesperon estis okazo por pliaĝuloj fari viziton. Aranĝite ankaŭ ĉi-jare, multaj programeroj ŝajnas esti jam establintaj tradiciojn, kaj certe aranĝotaj venontajn jarojn. Inter ili estis bakŝampionado, saŭnumado, ekstera ludado, naturo promeno kaj aliaj. Inter la novaĵoj estis prelego pri la tolkienia alva skribmaniero. Malgraŭ la multaj okazaĵoj kaj mallonga tempo estis ege trankvila etozo tipa por malgrandaj renkontiĝoj, kaj la partoprenintoj certe estas ege kontentaj. Jen pruvo ke la sveda esperantojunularo reaktiviĝis, kaj pli aktiviĝos!

Johan Krig Ölund



EL ESPERANTISTA VIVO

Mia hundino komprenas en Esperanto

En la pasinta somero, la hundino de mia plej aĝa frato naskis plurajn hundidojn kaj mi petis unu idon de la frato. Li donacis malgrandan hundinon al mi. La hundino estas blanka kaj nigra kun miksa sango, mi donis al ĝi la nomon "Wang Wang", tio signifas "prospero" en ĉina lingvo.

Ekde la unua tago, kiam la hundino venis al mi, mi komencis paroli kun ĝi nur en Esperanto. Mia edzino mokis min pro tio. Kial venis al mi la ideo, ke mi volis trejni la hundinon en Esperanto? Mi estis dufoje gastigita ĉe s-ro Andrzej Grzébowski en Bydgoszcz, Pollando. S-ro Andrzej Grzébowski havas hundon nomata en Esperanto "amulo". Amulo estas saĝa hundo, ĝi povas bone kompreni Esperanton, ĉar multaj fremdaj esperantistoj aŭ vizitas Bydgoszcz aŭ studas en Bydgoszcz. Oni ofte

parolas kun Amulo en Esperanto. Pro tio, venis al mi la ideo, ke ankaŭ mi trejnas mian hundinon per E-vortoj.

Pasis unu jaro. Nun mia hundino jam bone komprenas min en Esperanto, kvankam ĝi ne povas paroli. Mia edzino ne parolas en Esperanto, ofte ŝi estis devigita uzi ankaŭ E-vortojn por voki la hundinon. Foje, la edzino vokis la hundinon en ĉina lingvo, la hundino ŝajne ne komprenis ŝin kaj ne obeis in. La edzino iomete koleris kaj timigis la hundinon. La hundino vere sentis timon pro la severa tono, tamen ĝi ne scias, kion fari. Poste la edzino uzis E-vortojn en milda tono, la hundino ekkuris al ŝi kaj obeis in. Nun mia filino kaj la edzino tre ŝatas la hundinon. Multaj najbaroj admiras pro mia hundino kaj ankaŭ povas voki la hundinon per E-vorto "venu".

Liu Bao Guo, Hefei, Ĉinio



Novelaro estas planata

Eldona Societo Esperanto planas eldoni novelaron kun noveloj verkitaj en 2000-2009. Ni invitas ĉiujn verkemulojn sendi novelojn prefere retpoŝte al esperanto@globalnet.net aŭ papere al Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11, SE-961 76 Boden, Svedio. Ni ne resendos manuskriptojn. Limdato: 1a de Aprilo

Kulturkontaktoj ĉirkaŭ Baltika maro

Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-44) en tiu ĉi somero okazis en Ventspils, Latvio en la monato Julio. Estas la 44:a fojo por tia evento.

Ĉiuj tagoj havis interesajn kursojn kaj temojn. Mi partoprenis en esperantokurso paroliga. Ni havis tie demonstracion de naturmetodo por lerni lingvon, kun Peter Kuhnel de Berlin kiel instruisto. Estis tre lernoriĉa kurso!

Ĉiujn tagojn mi partoprenis en kurso de latva lingvo kun Biruta Rozenfelde de Riga kiel instruistino.

Matene ĉiujn tagojn ni havis tagan infompaperon kun priskribo de la kursoj, temoj kaj eventoj la venonta tago, kaj artikoloj kaj fotoj de la pasinta tago. En unu tia infompapero estis interesa portreto de Biruta Rozenfelde skribita. Ŝi estis deportita al Amur en Siberio, kiam ŝi havis nur 16 jarojn, kune sia tuta granda familio. Ŝi havis ses gefratojn. Kiam ŝi havis eblecon reveni al Riga, ŝi havis edukadon en fiziko, kaj ŝi poste estis instruistino en fiziko. Ŝi laboris kaj laboras en Riga Esperantoklubo en grandega kaj longedaŭra maniero.

Tri partoprenantoj estis de Japanio, kaj ili gvidis nin en origamio kaj kaleografio. Estis agrablaj horoj! De ili mi ricevis kiel donacon du interesajn novpresitajn librojn en Esperanto de Japanio. Unu libro kun la titolo "Japanio kalejdoskope" priskribas japanan kulturon (origamion, kaligrafion, haiku-poezion, muzikon, dancon, teatron k.t.p.). La dua libro estas valora libro de vjetnamaj virinoj, kiuj rakontas de siaj situacioj dum vjetnama milito kaj de siaj situacioj nuntempe.

Peter Kuhnel de Berlin rakontis de trafiksituaĉio en sia hejmurbo Berlin. Kerstin Rohdin, kiu tradukis "Fratoj Leonkoro" kaj "Emil en Lönneberga (Smolando) al Esperanto, rakontis pri Astrid Lindgren, kaj alian tagon ŝi legis monologon de verkisto kaj artisto Harold Brown.

Promenadoj kune en Ventspils, kun gvidantoj en Esperanto, montris simpatian urbon kun belegaj, bone prizorgitaj floroj en la tuta urbo. Ĝi estas verda urbo kun belegaj arboj kaj parkoj ĉie. Ĉiuj gardenoj kaj plantejoj estis plenaj de tre grandaj florantaj jasmen-arbedoj de malnovtempa kvalito kaj mirindaj florkomponaĵoj.

La unuan dimanĉon ni partoprenis en meso en katolika preĝejo en Ventspils, Preĝejo de Sankta Kruco. La tuta meso estis en Esperanto, kaj ĉiuj partoprenantoj ricevis la tekston de la meso, kaj ni povis partopreni en respondoj de preĝeja komunumo en diservo. La juna katolika pastro Maris Laureskis prizorgis la meson, kaj li estis tre lerta esperantisto.

Multaj bonaj vesperoj pasis. Bona muzikensemblo de Latvio kun junuloj, kune sia muzikinstruistino Austra Pompure, estis tre ŝatita de publiko. Unu de la lastaj vesperoj ni havis Internacian koncerton en la Kulturdomo de la urbo. Tie la partoprenantoj kunlaboris kun ludo en pianoforte, solokantoj, korusokantoj, poezio en esperanto kaj ĥorkomuna kantado en Esperanto kun akomponado de la ensemblo. Mi kunlaboris en programo kun prezentado de la sveda komponisto Richard Andersson (lernanto en pianoforteludo de fama pianistino kaj komponistino la Clara Schumann, kun ŝia edzo Robert Schumann). Mi ludis de liaj komponaĵoj, konstruitaj de fundamentoj de maljunaj, svedaj, popolaj kantoj.

Pli frue la veturo al Ventspils mi faris tradukon al Esperanto de la tre maljuna popola kanto "Dum somer' la bela" (Om sommaren sköna). Tiun ĉi kanton, kun notoj, akordoj, kaj teksto, mi donis al kelkaj esperantistoj en Latvio kaj Estonio, kaj ankaŭ al membroj en la bonludanta ensemblo.

Birgitta Ekvall

Kongreso de kristanoj

Ekde la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto kelianoj kongresis en Slovakio, en la vilaĝo Pribylina situata en la Tatra-montoj ĉe la limo al Pollando. La kongresejo nomiĝas Hotelo Esperanto. La kongresa temo estis "Dia regno", kiun ni pritraktis el ĉiuj vidpunktoj en preĝoj, dum diservoj kaj prelegoj. Ni ankaŭ pridiskutis teknikajojn kaj la enhavon de nia revuo "Dia Regno".

Lunde la 28-an de julio estis la alvena tago. Marde antaŭtagmeze okazis la inaŭguro de la kongreso en la evangelia preĝejo de Pribylina, kaj poste sekvis diservo en Esperanto. Vespere okazis interkona vespero, kiu montris ke ni estis 46 kongresanoj el 11 landoj, inter kiuj ni estis 6 svedoj. Marde posttagmeze ni ankaŭ faris ekskurson al natura parko, speco da slovaka Skansen (subĉiela muzeo) kun diversaj vidindaĵoj.

Ĉiutage, marde ĝis sabate ni komencis per matenpreĝo kaj finiĝis per vesperpreĝo. Dumtage okazis diversaj prelegoj. Merkrede, vendrede kaj sabate ni havis matene komunan kantadon spontanee.

Ĵaĝde okazis tuttaga ekskurso al la altaj Tatroj, al la bela lago ŝrbské Pleso kaj al la urbo Kéz'marok kaj ĝia bela kaj granda ligna preĝejo.

Vendrede KELI havis sian jarkunvenon. Vespere ni aŭskultis muzikgrupon, kiu ludis kaj kantis popolan muzikon ĉefe el Slovakio sed ankaŭ el aliaj landoj.

Sabate okazis duontaga ekskurso al la famaj Demanová-grotoj en la malaltaj Tatroj.

Dum dimanĉo okazis adiaŭa diservo en Esperanto, evangelia diservo en slovaka lingvo kaj adiaŭa vespero.

Lunde la 4-an de aŭgusto estis la fino de la kongreso kaj la forvetura tago.

Ni ŝuldas grandan dankon al frato Pavel Polnický kaj al aliaj helpantoj pro la modela aranĝado de nia kongreso.

Venontjare okazos ekumena kongreso en Vroclavo, Pollando.

La venonta KELI-kongreso verŝajne okazos en Hungario en la jaro 2010.

Matts Landfors

Partoprenantoj de BET 44.
Fotis: Birgitta Ekvall.



Kontaktoj virinojn

Ĉefaj Esperanto-aktivuloj fondis ankoraŭ unu novan asocion, kiu celas konvinki la civitanojn de Eŭropa Unio kaj la Eŭropan Parlamenton pri la neceso de komuna lingvo. La asocio "E-lingvo" promesas uzi "modernajn metodojn", kaj ĝia ĉefa montrofenestro estas tre profesiece fasonita retejo. Tamen la argumentoj prezentataj en la moderna retejo impresas tre malnovmode. Jam sur la frontpaĝo la asocio klare montras siajn elirpunktojn, prezentante bildon de juna virino, kaj demandante: "Ĉu vi timas alparoli virinon en eksterlando? Koncentri ĉu je ideoj kaj agoj, ne je la lingvoj!"

www.liberafolio.org

Firefox nun oficiale en Esperanto

Oficiala versio de la populara, libera retnaviga programo Firefox, foje nomata ankaŭ "Fajrovulpo", nun ekzistas ankaŭ en Esperanto.

La unua versio de la traduko estis publikigita antaŭ unu jaro, kaj tiam ĝi estis distribuata kiel aldonaĵo, per kiu eblas kompletigi ajnalingvan version de Firefox. Por esperantigi la kromprogramon necesis unue havigi al si alilingvan version de Firefox kaj kromprogramon por alti inter la diverslingvaj versioj de la kromprogramo.

Ekde la sekva versio de Firefox, Esperanto evidente eniros la oficialan liston de lingvoversioj, kaj la Esperanta traduko estos distribuata memstare. Tio grave simpligos la instaladon. Jam nun en la oficiala retejo de Firefox inter la diverslingvaj beta-versioj de Firefox 3.1 elŝuteblas ankaŭ la esperantlingva traduko.

La esperantan tradukon dum longa tempo prilaboris teamo gvidata de Eduardo Trápani el Urugvajo. La teamo havis densan kontakton kun alia projekto, la tradukado de la ampleksa libera programaro OpenOffice.org, kaj grandparte sukcesis kunordigi la du tradukojn, tiel ke oni uzas la samajn terminojn en ambaŭ. Helpis en tio ankaŭ la retejo de la Komputekoprojekto.

blog.ikso.net/www.liberafolio.org

Buller ĉe finna Ĉinoj retbabilas ambasadoro Esperante

La ambasadoro de Finnlando en Nederlando, s-ro Mikko Jokela, akceptis la 28-an de oktobro la ĝeneralan Direktoron de UEA Osmo Buller en la ambasado por duhora interparolado. La ambasadoro faris la inviton, ĉar pro sia ferio en julio li ne povis viziti la Universalan Kongreson en Roterdamo.

Dum la renkontiĝo oni traktis praktike iujn kampojn de la agado de UEA. La ambasadoro estis tre interesita pri la historio de UEA kaj Esperanto, kaj aparte pri la rolo de Esperanto kiel kultura pontolingvo. Tiu lasta temo speciale interesis lin pro tio, ke antaŭ sia diplomata kariero li multe esploris internacian kulturalan interŝanĝon, precipe librokaj kino-komercon. Liaj esploroj montris grandegan superregon de la angla lingvo kaj ke la interŝanĝo ĉefe signifas kulturalan fluon el grandaj landoj al malgrandaj.

...kaj en Koreio

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, vizitis Korean Respublikon de la 16-a is la 21-a de oktobro. Li partoprenis en la 40-a Korea Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la urbo Busan la 18-an kaj 19-an kun ĉ. 170 kongresanoj. Buller prelegis en la kongreso pri la temo "UEA kiel reprezentanto de esperantistoj sur mondaj forumoj".

Unu tagon la Ĝenerala Direktoro de UEA dediĉis al konatiĝo kun la kondiĉoj por ebla okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en Busan en la jaro 2012. Post la sukcesa Seula UK en 1994 koreaj esperantistoj, kun forta subteno de urbaj kaj landaj aŭtoritatoj, pretas gastigi duan UK-on ĝuste en Busan, kie troviĝas elstare bona kongresejo. Kandidatiĝo de Busan por UK 2012 estis la ĉefa diskuttemo dum la renkontiĝoj de Buller kun la Busana vicurbestro s-ro An Joon-Tae.

La vizito donis bonan okazon por interparoloj kun prezidanto Park Wha-Chong kaj aliaj estraranoj de KEA pri vasta gamo da komunaj temoj. Tre utilaj estis la intertraktoj pri movadaj demandoj de Azio kun s-ro Lee Jung-kee, prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado. En Seulo Buller vizitis ankaŭ la oficejojn de KEA kaj Seula Esperanto-Kulturcentro.

En la ĉina urbo Foshan, proksima al Kantono, la 17-an de oktobro okazis interesa lerneja eksperimento, ene de la kurso de Esperanto instruata ĉe la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj studoj de tiu urbo. Profitante la bonajn teknikajn eblecojn de la lernejo oni starigis retbabiladon kun pola esperantistino, Grazyna, mem instruistino, de la urbo Toru.

La junaj gelernantoj (inter 16 kaj 20 jaraj) havis la okazon paroli kun ĝi pere de la reto, kaj eĉ vidi in en giganta ekrano. Ĝi kaj la gelernantoj interŝanĝis salutvortojn, faris facilajn demandojn, kaj ĝi eĉ povis rigardi kiel oni instruas Esperanton al la gejunuloj.

Kaj kiel granda surprizo komence de la klaso aperis brazila esperantisto, Silvio Kniess, kiu ankaŭ babiladis kun ili (kompreneble simplaj frazoj, ĉar temis nur pri la 3a klaso). Eble por ili unuafoje en sia vivo estis ebleco babiladi kun eksterlandanoj. Tio multege kuraĝigis ilin en la lernado de Esperanto.

La profesoro demandis al la gelernantoj: Vi devige studas la anglan lingvon, dum multaj jaroj. Kun kiom da eksterlandanoj is nun vi parolis pere de la angla lingvo? Ĉiuj respondis: kun neniu. Do, ili nur en tri tagojn povis retababili kun franca esperantisto, Michel Fontain, kun pola esperantistino, Grazyna, kaj vid-al-vide kun Silvio, brazilano, kaj Augusto Casquero, hispano, ilia instruisto.

En la kurso partoprenas ĉirkaŭ 50 gelernantoj de la kurso, inter kiu ankaŭ lernas kelkaj profesoroj. Jam estas vico da alilandaj esperantistoj kiuj volas babiladi kun ili.

Augusto Casquero/
www.liberafolio.org

Okaze de la tago de UN - Unuiĝintaj Nacioj

"Unuiĝintaj Nacioj oficiale ekekestis la 24-an de oktobro 1945, kiam la ĉarton ratifis Ĉinujo, Francujo, USSR, Britujo, Usono kaj plimulto el la aliaj subskribintoj. La Tagon de UN oni festas iujare la 24-an de oktobro", ni legas sur la UN-retpaĝaro.

Ne en iu jaro, ne okaze de iu memorinda tago ni trafas interŝanĝi seriozajn pensojn. La aparte reliefaĵoj -- 50, 60, 100 -- ofte devigas nin rigardi realaĵojn, kiujn ni alie nerigardus. Kaj tiu prodevisa rigardo ne nepre plisaĝigas nin.

Tamen, malgraŭ ĉi tiuj ĉiutagaj avertoj pri la grizeco de nia kutima psika ĉielo, mi fervore petas vin, geamikoj, fidi al la kapablo de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj iom post iom alproksimiĝi al la tasko respiguli la verajn kolektivajn pensojn de la homaro, kaj agi surbaze de tiuj pensoj.

Mi tion diras ne malplej pro la media katastrofo, kiu disvolviĝas en nia hodiaŭo kaj ombras sur nian morgaŭon. Se ne ekzistus UN kaj la parencaj sistemoj de ellaborado de interkonsentoj, la homaro simple ne disponus pri rimedoj kontraŭ tiu ĉi katastrofo. Ni ankoraŭ havas la eblon kune agi por malebligi, ke la medimisiĝo atingu tute krizan skalon kaj neniigu grandan parton de la esperoj de la homa specio.

Multaj el ni ankoraŭ ne tre intime ligas la temojn de konservo de la vivmedia diverseco kun la konservo de la lingva diverseco, nek la temojn de tiuj konservoj kun la esperoj, kiujn simbolas Esperanto kaj por kiuj laboras niaj lingvanoj. Tute ne volante trudi tagordon al tiuj, kiuj pripense rezistas in, mi volas tamen uzi la simolan valoron de tiu ĉi tago por atentigi iujn, ke ekzistas tiu ĉi eblo en nia repertuaro.

Tiuj inter ni, kiuj pripense rezistas al la tagordo de la multlingvismo, kaj kiuj volas unike Esperanto-parolantan homaron morga (forgesintan iujn aliajn lingvojn), estas miaj "ne-amikoj". (Tiun ĉi esprimon mi lernis, koresponde, de la granda poeto Jiri Karen, kiu havis nur amikojn -- la jes-amikojn, kiuj ajne konsentas, kaj la ne-amikojn, kiuj ajne ne konsentas pri miaj pensoj -- kaj iuj miaj amikoj nutras



mian pensipovon.) Mi forte esperas, ke miaj ne-amikoj klarigos al mi antaŭ la Tago de UN de 2009, kiamaniere la homaro konservas sian scian bazon rilate la arbarajn riĉaĵojn de ekz. Nov-Gvineo, se iuj novgvineaj lingvoj pereos.



Mia Esperanto estas aliancano de la lingvanaroj, kiuj volas, ke ankaŭ iliaj lingvoj daŭrigu kaj moderne vivu, kun plena konservo de sia tradicia scio-banko. Mi scias, ke aliajn Esperantojn parolas aliaj, kies ideo de moderneco ne baziĝas sur serioza estimo por la scioj de la indiĝenaj popoloj. Mi esperas, ke mi povas paroli kun tiuj ne-amikoj vere komunan Esperanton, per kiu ni povos trans ĉi tiuj kaj parencaj diferencoj.

Mi intence elektis la temon de indiĝenaj popoloj en mondo, kies Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ ne metis antaŭ si formalan celon rekrei sin kiel unuiĝon de popoloj. Eble prave;

eble ne la popoloj estu nia privilegia pripensa unuo; pro la leviganta konscio pri raso, pri seksoj, pri orientiĝoj, pri la apartaj rajtoj kaj bezonoj de handikapuloj, ni estas prave skeptikaj ankaŭ pri la nacioj. Tamen, io devas funkciigi la trafikajn lumojn, kaj mi restas vetanto je la UN-sistemo, manke de pli bonaj proponoj, kaj pro la granda investo prave farita de la homaro. Mi ne vidas, ke ĉi-momente alian seriozan esperon povas formuli la demokratoj de la mondo. Por reveni al la dialogo kun miaj ne-amikoj -- en demokratio, estas aparte grave paroladi trans la baroj, kun la ne-amikoj en la diversaj opozicioj.

Altestime al niaj opozicioj, sed espereble ne neglektante miajn jes-geamikojn,

Probal Dasgupta
Prezidanto de UEA

Probal Dasgupta, (n. 1953, en Kalkato, Barato/Hindio). Tradukis en Esperanton, verkis en Esperanto, leksika esploristo, nuna prezidanto de UEA. Li estis elektita por trijara periodo en la Jokohama Universala Kongreso en aŭgusto 2007.

Prenumerera!

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2009. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29 -5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Tyvärr måste jag höja alla avgifter på grund av kronans svaga värde. Jag skickar gärna provexemplar av någon tidning, om ni hör av er. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, Tel 0415-50152.

Tidning	nr/år	pris kr
Esperanta Finnlando	6	225
Esperanto	11	350
Esperanto en Danio	5-6	130
Femina	4	223*
Heroldo	17	385*
Juna Amiko (rabatt från 3 ex)	3	142(112)
Komencanto	6	183*
Kontakto	6	220
La Jaro	1	49
La Kancerkliniko	5	255
La Ondo	11	385
La Ondo rete		120
Literatura Foiro	6	345*
Litova Stelo	6	142
Monato	11	466
Monato (retversio)		280
Norvega Esperantisto	6	110
Oomoto, nur rete		senpage
www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf		
Ret-Ventoĵ		senpage
www.esperanto.hu/eventoj/		
Scienca Revuo	4	205
TEJO-tutmonde	4	110

Tidningar markerade med * har inte lämnat prisuppgift för 2009

TRA LA LANDO UN-tago en Sundsvall

En Sundsvall, la loka klubo kunlabore kun junulara grupo en Härnösand partoprenis la UN-tagon, 24 oktobro, per du librotabloj en malsamaj lokoj, kaj prelego en unu el la lokoj.

Pri la instituto

Sveda Esperanto-Instituto havis sian jarkunvenon la 18-an de oktobro en Gotenburgo. La tuta direkto, Lars Forsman, Inga Johansson, Folke Wedlin, Birgitta Anevik kaj Ann-Louise Åkerlund, estis reelektita.

Ann-Louise Åkerlund

LINGVO

NEKROLOGO

Från hålkort till realtid

En del icke-esperantister verkar ha uppfattningen att det inte går att tala om mo-derna företeelser som datorer och internet på esperanto. En nyutkommen ordbok med över 7500 datorrelaterade termer på engelska och esperanto kanske kan övertyga om motsatsen?

Språkspalten i La Espero 2008:2 handlade delvis om facktermer och översättning, och i förra numret fanns en notis om en ny ordlista över data-termer. Boken ifråga, Komputeko – prikomputila terminokolekto är en terminologiordlista utgiven av E@I, Edukado@Interreto. Enligt uppgift innehåller den över 7500 termer, med uppslagsorden på engelska och motsvarande term på esperanto. I pappersform är den i A5-format och strax under 100 sidor tjock, men den finns också i sökbar form på nätet, www.komputeko.net. Nätversionen innehåller dessutom en del av de olika termerna på nederländska, tyska och franska.


Termerna täcker såväl hårdvara ('aparataro') som mjukvara ('programaro') och vanliga aktiviteter och begrepp i program för bildbehandling, ordbehandling, e-post och programmering, för att bara nämna några områden.

Till skillnad från t.ex. Svenska datatermgruppens ordlista (som för närvarande innehåller lite drygt 1000 sökord med både engelska och svenska blandat) innehåller Komputeko inga definitioner eller förklaringar av termerna, utan bara rekommenderade motsvarande termer på esperanto. I förekommande fall då det engelska ordet kan användas i olika sammanhang eller på olika sätt, t.ex. antingen som verb eller substantiv, finns det dock angivet vilken form som avses. För förklaringar på esperanto finns istället hänvisningar till de befintliga ordlistor och uppslagsverk som använts som källor, bl.a. Reta Vortaro, Wikipedia (esperantoversionen av det fria uppslagsverket Wikipedia), Sergio Pokrovskijs Komputada leksikono och inte minst PIV.

Olof Pettersson



Karl Buremo



Karl Buremo naskiĝis la 23-an de aprilo 1913 en la vilaĝo Bureå. Li mortis la 27-an de aŭgusto 2008, 95-jara.

Li vizitadis la teknikan lernejon de Hässleholm kaj perfektigis sin pere de korespondaj kursoj. Lia unua okupo estis kiel ingeniero ĉe la feruzino Avesta Järnverk kaj poste deĵoris en la uzino Åkers Styckebruk. En Nacka li laboris ĉe Alfa Laval ekde 1947 is 1962, kiam la familio transloki is al Jönköping. Tie li deĵoris ĉe Svenska Gjuteriföreningen ĝis sia pensio 1978. Li ankaŭ praktikis en Bruselo dum sia dungo ĉe Alfa Laval.


En Bureå Karl partoprenis en ia eklezia junularorganizo. En sia junaĝo li studis Esperanton. En 1947 Karl kaj Stina membriĝis en la Sveda Esperanto-Federacio kaj la kristana asocio KELI, en kies internacia estraro li estis membro dum du jaroj. Li partoprenis en multaj UEA kaj KELI-kongresoj kaj kongresoj ekumenaj. Por IBRA radio li surbendigis plurajn predikojn, tiel same por la kristana radiostacio HCJB en Ekvadoro. Ek de 1962 Karl Buremo estis membro de la eklezia komunumo de la Ansgara preĝejo (Sveda Misia eklezio), kiam ili transloki is de la misia komunumo de Björknäs.

Li estas karmemore funebrata de Stina kaj la infanoj Lennart kaj Ingrid. La Sveda Esperantofederacio, KELI kaj UEA perdis fidelan membron. La komunumo de la Ansgara preĝejo sentos la foreston de bona ekleziano.

Arne Lundkvist

Aniario – libro pri malbona estonteco

Ne, Aniario ne estas libro por komencantoj, sed tiu ĉi artikolo estas skribita per facila lingvo. Ĝi konsistas nur el la plej oftaj 500 vortoj kaj el kelkaj, kiujn mi klarigos post la artikolo.



Aniario en Esperanto kostas nur 85 kronojn. Vidu la retpaĝon de Eldona Societo Esperanto (Esperantoförlaget) <http://www.algone.t.se/~eldona/>

La svedo Harry Martinsson verkis la libron Aniario. La libro aperis en 1956. Ĝi temas pri la est-ont-eco de la homaro. Aŭ pli ĝuste: la verkisto timas ke la est-ont-eco de la homaro estos malbona.

En la komenco de la libro okazas katastrofo* sur la tero. Multaj homoj mortas. la aliaj devas veturi per kosmo*ŝipo al alia loko en la kosmo. Tamen okazas nova katastrofo. Malfunkcias la kosmoŝipo. La kosmoŝipestro Ĉefone ne volas diri la veron, ke la kosmoŝipo ne funkcias.

Multaj homoj en ĝi tamen ekkomprenas ke la kosmoŝipo ne venos al la ĝusta loko. Ĝi ĉiam nur iros en la kosmo kaj ĉiuj homoj en ĝi devos iam tie morti.

La 103 poemoj en la libro temas pri la vivo en la kosmoŝipo ĝis kiam la lasta homoj tie mortas. La homoj en-am-iĝas, amas kaj malama. Ili

serĉas diversajn plezurojn. La plej grandan plezuron donas la Mimo. ĝi estas granda televid-ilo aŭ komputilo*, kiu montras diversajn okazaĵojn al la homoj. La homoj ankaŭ multe memoras kaj rakontas pri la iama vivo sur la tero en la bela Doris-urbo.

En la libro estas multaj novaj vortoj, kiujn la verkisto mem faris.

Harry Martinsson havis grandan intereson pri scienco. Li verkis Aniaron, ĉar li tamen timis ke la homoj per tehniko* kaj scienco metos finon al la vivo sur la tero. Li demandas ĉu la homoj uzos siajn grandajn sciojn por la bono aĝ por la malbono de la homaro.

Oni tradukis Aniaron al multaj lingvoj. En Esperanto ĝi aperis en 1979. Bertil Nilsson unue tradukis ĝin al Esperanto. Poste William Auld faris poezion el la traduko de Bertil Nilsson.

La verkisto Harry Martinsson ricevis Nobel-premion*, parte pro

Aniario, sed ankaŭ pro aliaj libroj. Samtempe alia svedo, Eyvind Jonsson ricevis la premion. Multaj svedaj gazetoj tamen skribis ke estas malbone ke la Sveda Akademio* donas la premion al du svedoj, kiuj estas anoj de la Sveda Akademio. Do, ili donis premion al si mem. Harry Martinsson, poste mort-igis sin mem.

Leif Nordenstorm

Katastrofo: Subita mal-facil-ega okazaĵo kiam mortas multaj homoj

Kosmo: La universo, kie estas suno, luno, steloj kaj planedoj

Komputilo: Aparato, kiu pri-laboras informojn, uzebla i.a. por interreto

Tehniko: Metodoj por fabriki aŭ metie labori

Premio: Donaco, mono kaj/aŭ diplomo, kiun ricevas inda homo

Akademio: Organizaĵo de lertaj artistoj, verkistoj aŭ sciencistoj.

1

Mia renkont' unua kun Doriso
brilas per lum' la lumon mem garnunta.
Mi diru simple, ke la renkontigo
unua, same simpla, kun Doriso
jam estas bildo, kiun ĉiutage
ekvidas ĉiu en la kluzaj haloj
kie la elmigrontoj trairas
por kriz-ekskursoj al la tundroglobo,
nuntempe, kiam Tero tiel statas,
ke tempo de ripozo kaj trankvilo
kaj kvaranteno por ŝi preparatas.

Ŝi kartojn skribas, brilas kvin ungetoj
tra l' halkrepusko kiel sombraj lampoj.
Ŝi diras: skribu vian nomon kie
blondeco mia lumas basradie.

Ŝi diras: jenan karton tenu ĉe vi
kaj se danĝero sin minacos levi,
kian mencias paĝo ducent-oka,
kaj sekvos skuo landa kaj epoka,
tiam ĉi tjen venu, kaj sciigu
kio vin premas, per indik' ĉi-loka.

Ĉu celas vi al orienta tundro
sur Mars' aŭ okcidenta, skribu via plumo.
Estas skribite jen, ke ĉiu devas
kunporti kruĉon da senpaga humo.
Sigelos kaj registros po persono
tri kubajn futojn mi, en minimumo.

13

Haĉjo kaj Grenjo

Apud granda arbaro vivis malriĉa lignohakisto kun siaj edzino kaj du infanoj; la knabeto estis nomata Haĉjo, la knabino Grenjo. La lignohakisto ne havis multon por dividi kaj manĝi, kaj foje, kiam en la lando ekregis granda kareco, eĉ la ĉiutaga pano ekmankis al li. Kiam li vespere meditis pri tio kaj pro ĉagreno sin turnadis en la lito, li ekĝemis kaj diris al sia edzino:

"Kion ni faros? Kiamaniere ni nutros la infanojn, se ni mem havas nenion?"

"Ĉu vi scias," diris la edzino, "ni kondukos morgaŭ frumatene la infanojn en la arbaron en plej densan lokon. Ni ekbruligos fajron por ili, donos al ĉiu pecon da pano, lasos ilin solaj kaj revenos al nia laboro. Ili ne trovos la vojon hejmen kaj ni liberigos nin de ili."

"Ne," diris la edzo, "tion mi ne faros. Mia koro ne permesus al mi lasi la infanojn solaj en la arbaro; sovaĝaj bestoj tuj alkurus kaj disirus ilin."

"Malsaĝulo," diris la edzino, "alie ni ĉiuj kvar mortos pro malsato, vi jam povas raboti tabulojn por la ĉerkoj."

Ŝi tiel turmentis lin, ke fine li konsentis.

"Domaĝo, kia domaĝo, malfeliĉaj infanoj" diris la lignohakisto.

Ankaŭ la infanoj ne povis ekdormi pro malsato kaj aŭdis, kion la duonpatrino diris al la patro. Grenjo ploris maldolĉajn larmojn kaj diris al Haĉjo:

"Venis nia fino."

"Trankviliĝu Grenjo," respondis Haĉjo, "ne malesperu, ni trovos rimedon."

Kiam la maljunuloj ekdormis, li leviĝis, sin vestis, malfermis la pordeton kaj ŝteliris eksteren. Hele lumis la luno, kaj la blankaj ŝtonetoj, kiuj kuŝis antaŭ la domo, brilis kiel dukatoj. Haĉjo kliniĝis kaj kolektis tiom da ili, kiom povis teni lia poŝo. Poste li revenis en la ĉambron kaj diris al Grenjo:

"Timu nenion, kara fratineto, kaj dormu trankvile. Dio ne forlasos nin."

Li ree kuŝiĝis kaj ekdormis. Kiam tagiĝis, jam antaŭ la sunleviĝo la duonpatrino vekis la infanojn:

"Leviĝu, maldiligentuloj, ni iros en la arbaron por alporti lignon."

Ŝi donis al ĉiu peceton da pano: "Jen por la tagmanĝo, sed ne manĝu pli frue, ĉar vi ricevos nenion plu."

Grenjo prenis la panon sub la antaŭtukon, ĉar Haĉjo havis la

ŝtonojn en la poŝo. Ĉiuj ekiris en la arbaron. Kiam ili iom iris, Haĉjo haltis, rigardis malantaŭen al la domo kaj poste senĉese sin turnis tien. La patro diris:

"Haĉjo, kial vi tien rigardas kaj restas malantaŭe? Ĉesigu kaj ne forgesu pri viaj piedoj."

"Paĉjo, mi rigardas mian blankan kateton, ĝi sidas sur la tegmento kaj volas diri adiaŭ al mi."

"Malsaĝulo," diris la duonpatrino, "tio ne estas via kateto, tio estas la matena suno, kiu lumigas la kamentubon."

Sed Haĉjo ne adiaŭis la kateton, li ĵetis la blankajn ŝtonetojn ĉiam po unu sur la vojon.

Kiam ili venis en la mezon de la arbaro, la patro diris:

"Kolektu lignon, infanoj, mi ekbruligos fajron, estas malvarmege."

Haĉjo kaj Grenjo alportis vergaĵon, tutan monteton da ĝi. Oni ekbruligis ĝin, kaj kiam la flamoj alte brulis, la duonpatrino diris:

"Kuŝiĝu, infanoj, apud la fajro kaj ripozu. Ni iros en la arbaron haki. Kiam ni finos la laboron, ni revenos kaj kunprenos vin."

Haĉjo kaj Grenjo sidis apud la fajro kaj tagmeze manĝis ĉiu sian pecon da pano. La infanoj pensis, ke la patro estas proksima, ĉar ili aŭdis batojn de la hakilo. Sed tio ne estis hakilo, ĝi estis branĉo, kiun li ligis al seka arbo kaj kiun la vento ĵetadis en ĉiujn flankojn.

Ili sidis tiel longe, fine iliaj okuloj fermiĝis pro laciĝo kaj ili ekdormis. Kiam ili vekigis, estis jam malluma nokto. Grenjo komencis plori kaj diris:

"Kiel ni eliros el la arbaro!" Haĉjo konsolis ŝin:

"Atendu momenton, la luno leviĝos kaj ni trovos la vojon." Kiam leviĝis la plena luno, Haĉjo prenis Grenjon per la mano kaj iris serĉante la ŝtonetojn, kiuj brilis kiel novaj arĝentaj moneroj kaj montris al ili la vojon. Ili iris la tutan nokton kaj ĉe tagiĝo venis al la patra domo. Ili frapis la pordon kaj kiam la duonpatrino ilin vidis, ŝi diris:

"Malbonaj infanoj, kial vi tiel longe dormis en la arbaro. Ni pensis, ke vi tute ne revenos."

Sed la patro ĝojis, ĉar la konscienco riproĉis lin, ke li lasis ilin solaj.

Post ne multe da tempo la mizero revenis en la domon kaj la infanoj nokte aŭdis, kiel la patrino parolas en la lito al la patro:

"ĉio jam estas konsumita, ni havas ankoraŭ duonon da panbulo, kaj poste... finita estas la kanto. Ni devas liberiĝi de la infanoj, ni kondukos ilin pli profunde en la arbaron, por ke ili ne retrovu la vojon; ne ekzistas alia savo por ni."

Granda pezo ekpremeĝis la koron de la patro kaj li diris:

"Pli bone estus, se vi dividus kun la infanoj vian lastan peceton."

Sed ŝi ne volis aŭskulti kaj riproĉis lin:

"Kiu diris 'a', devas diri ankaŭ 'b'; ĉar li cedis la unuan fojon, li devas cedi ankaŭ nun."

La infanoj ne dormis kaj aŭdis la interparoladon. Kiam la gepatroj ekdormis, Haĉjo leviĝis, volis iri eksteren kaj kolekti ŝtonetojn, kiel antaŭe, sed la patrino ŝlisis la pordon kaj li ne povis eliri. Li konsolis la fratineton kaj diris:

"Ne ploru, Grenjo, kaj dormu trankvile. Dio helpos nin."

Frumatene la patrino venis kaj vekis la infanojn. Ili ricevis po peco da pano, sed ĝi estis ankoraŭ pli malgranda ol la unuan fojon. Sur la vojo en la arbaron Joĉjo dispecigis ĝin en la poŝo, ofte haltis kaj ĵetis peceton teren.

"Haĉjo, kial vi haltas," diris la patro, "iru vian vojon."

"Mi rigardas al mia kolombeto, kiu sidas sur la tegmento kaj volas diri adiaŭ al mi," respondis Haĉjo.

"Malsaĝulo," diris la patrino, "tio ne estas via kolombeto, tio estas la matena suno, kiu lumigas la kamentubon."

Dume Haĉjo ĵetis ĉiujn pecetojn unu post la alia sur la vojon.

La duonpatrino kondukis ilin ankoraŭ pli profunde en la arbaron, kie ili estis neniam dum sia tuta vivo. Ree oni ekbruligis grandan fajron, kaj la patrino diris:

"Sidu ĉi tie, infanoj, kaj kiam vi estos lacaj, vi iom dormu: ni iros en la arbaron haki lignon, kaj vespere, kiam ni finos la laboron, ni revenos kaj kunprenos vin."

Tagmeze Grenjo dividis sian panon kun Haĉjo, kiu disŝutis sian pecon sur la vojon. Poste ili ekdormis kaj vespero pasis, sed neniu venis al la malfeliĉaj infanoj. Ili vekigis nur en malluma nokto kaj Haĉjo konsolis la fratineton per la vortoj:

"Atendu, Grenjo, kiam la luno leviĝos, ni vidos la panajn pecetojn; ili montros al ni la vojon hejmen."

Kiam aperis la luno, ili ekiris, sed ili ne trovis la pecetojn, ĉar la miloj da

birdoj, kiuj flugas en la arbaro kaj super la kampo, manĝis la panon. Haĉjo diris al Grenjo:

"Ne timu, ni retrovos la vojon," sed ili ne trovis ĝin.

Ili iris la tutan nokton kaj la tutan tagon de la mateno ĝis la vespero, sed ne eliris el la arbaro. Ili estis tre malsataj, ĉar ili manĝis nur kelke da beroj, kiujn ili trovis sur la tero. Ili estis tiel lacaj, ke la piedoj ne volis plu porti ilin; ili kuŝiĝis sub arbo kaj ekdormis.

Estis jam la tria mateno de la tempo, kiam ili forlasis la patran domon. Ili ree ekiris antaŭen, sed la arbaro estis pli kaj pli densa. Ili estus pereintaj sen helpo, kiu venis al ili.

Tagmeze ili ekvidis sur branĉo belan neĝblankan birdeton, kiu tiel bele kantis, ke la infanoj haltis kaj aŭskultis. Kiam ĝi finis, ĝi eksvingis la flugilojn kaj flugis antaŭ la infanoj. Ili iris post ĝi, ĝis ili venis al dometo. La birdo sidigis sur la tegmento. La infanoj proksimiĝis kaj rimarkis, ke la domo estas konstruita el pano kaj kovrita per kukoj; la fenestroj estis el hela sukero.

"Jen bona vespermanĝo por ni," diris Haĉjo. "Mi manĝos pecon el tegmento kaj vi, Grenjo, provu la fenestron, ĝi estas dolĉa."

Haĉjo etendis la manon kaj derompis peceton de la tegmento, Grenjo stariĝis antaŭ la fenestro kaj mordetis la vitron. Subite voĉo el la domo ekkriis:

"Mi aŭdas mi krak' krak' mordeton, kiu manĝas la dometon?"

La infanoj respondis:
"La vento per sia flugilo,
la vento, ĉiela la filo."

Kaj ili manĝis senĝene. Haĉjo, kiu trovis la tegmenton tre bongusta, deŝiris grandan pecon, Grenjo elpuŝis tutan rondan fenestran vitron kaj manĝis ĝin kun apetito. Subite la pordo malfermiĝis kaj virino, maljuna kiel la mondo, apogante sin sur lambastono, eliris el la domo. Haĉjo kaj Grenjo tiel ektimis, ke ili ellasis el la manoj, kion ili tenis en ili. La maljunulino balancis la kapon kaj diris:

"Karaj infanoj, kiu alkondukis vin ĉi tien? Eniru kaj restu ĉe mi sentime."

Ŝi prenis la infanojn per la mano kaj kondukis ilin en la dometon. Bona manĝaĵo estis tie preparita: lakto, dolĉaj kukoj, pomoj kaj nuksoj. Poste oni sternis blankan litajon; Haĉjo kaj Grenjo kuŝiĝis en du litoj kaj pensis, ke ili estas en la ĉielo.

La maljunulino nur ŝajniĝis bonecon. Ŝi estis malica sorĉistino, kiu embuskis al infanoj kaj konstruis la panan domon por logi ilin. Ĉiun infanon, kiun ŝi kaptis, ŝi mortigis, kuiris kaj manĝis. Tio estis ŝia festo. La sorĉistinoj havas ruĝajn okulojn

kaj ne povas vidi malproksimen, sed ili havas senteman flaradon, kiel la bestoj, kaj sentas, kiam la homoj venas. Kiam Haĉjo kaj Grenjo proksimiĝis, ŝi malice ekridis kaj diris:

"Ili jam estas miaj. Ili ne forkuros, ne, ne!"

Frumatene, antaŭ ol la infanoj vekiĝis, ŝi jam estis sur la piedoj kaj rigardante la belajn rozvangujn infanojn en la litoj, ŝi murmuris al si: "Bongusta peceto!"

Ŝi kaptis Haĉjon per siaj sekaj manoj, forportis lin en malgrandan stalon kaj fermis la kradpordon. Neniel efikis liaj krioj. Poste ŝi iris al Grenjo, skuis ŝin kaj kriis:

"Leviĝu! Alportu akvon kaj kuiru ion bonan por via frato. Li sidas en la stalo kaj devas grasiĝi. Kiam li estos grasa, mi lin manĝos."

Grenjo maldolĉe ploris, sed vane; ŝi devis fari, kion postulis la sorĉistino.

Oni kuiris por Haĉjo plej bonan manĝaĵon, sed Grenjo ricevis ĉiam nur kankrajn konkajn. Ĉiumatene la maljunulino iris en la stalon kaj diris:

"Haĉjo, etendu la fingrojn, por ke mi palpu, ĉu vi jam estas grasa."

Sed Haĉjo etendis al ŝi osteton, kaj la maljunulino, kiu havis malklaran vidon, ne rimarkis tion kaj pensis, ke ĝi estas la fingro de Haĉjo. Ŝi miris, ke li tute ne grasiĝas.

Pasis kvar semajnoj, kaj Haĉjo ĉiam restis malgrasa; la maljunulino malpacientiĝis kaj ne volis plu atendi:

"Grenjo, Grenjo," ŝi kriis, "rapide alportu akvon, morgaŭ mi buĉos Haĉjon, ĉu li estos grasa aŭ ne."

Ah, kiel ĝemis la malfeliĉa fratineteto, kiam ŝi devis porti akvon, kaj kiel fluis la larmoj sur ŝiaj vangoj.

"Dio nia," ploris ŝi, "kial la sovaĝaj bestoj ne disŝiris nin en la arbaro! Ni estus mortintaj kune."

"Fermu la buŝon!" diris la sorĉistino, "nenio helpos vin."

En la sekvinta mateno Grenjo devis pendigi kaldronon kun akvo kaj ekbruligi sub ĝi fajron.

"Antaŭe ni bakos panon," diris la maljunulino, "mi jam varmegigis la fornon kaj knedis la paston."

Ŝi alpuŝis la malfeliĉan Grenjon al la forno, el kiu jam eliĝis flamoj.

"Enrampu," diris la maljunulino, "kaj rigardu, ĉu oni jam povas enŝovi la panon!"

Se la knabineto farus ĝin, la sorĉistino fermus la fornon por manĝi poste la bakitan infanon. Sed Grenjo komprenis ŝiajn pensojn kaj diris:

"Mi ne scias, kiel tion fari."

"Malsaĝa ansero," diris la krimulino, "la truo estas granda; mi mem povus eniri," kaj ŝi metis la kapon en la fornon. Grenjo per forta puŝo enigis ŝin profunde kaj riglis la feran pordon. Terure kriegis la sorĉistino,

sed Grenjo forkuris kaj la sendia sorĉistino mizere pereis.

Grenjo kuris rekte kiel sago al Haĉjo, malfermis la stalon kaj ekkriis:

"Haĉjo, ni estas liberaj, la maljuna sorĉistino ne vivas plu!"

Haĉjo elsaltis kiel birdo el kaĝo, kiam oni malfermas al ĝi la pordon. Kiel ĝojis la infanoj, ĉirkaŭprenis kaj kisis unu la alian, kiel ili saltis! Nun ili ne bezonis timi, ili iris en la domon, kie en ĉiuj anguloj staris kestoj plenaj de perloj kaj multekostaj ŝtonoj.

"Ili estas ankoraŭ pli belaj ol ŝtonetoj," diris Haĉjo kaj plenigis siajn poŝojn. Ankaŭ Grenjo volis alporti ion hejmen kaj plenigis sian antaŭtukon.

"Sed nun ni iru for de ĉi tie por eliri el la sorĉarbaro."

Ili iris kelkajn horojn kaj venis al granda akvujo.

"Ni ne povas transiri," diris Haĉjo, "mi ne vidas ponton."

"Nek ŝipeton," respondis Grenjo, "sed jen naĝas blanka anaso, mi petos, ke ŝi helpu nin."

Ŝi vokis:

"Mankas ponto, ho anaso, Savu nin el embaraso!"

La anaso proksimiĝis, Haĉjo sidigis sur ĝin kaj petis la fratineton sidigi apud li.

"Ne," respondis Grenjo, "tro peze estos por la anaseto; ĝi transportos nin unu post la alia."

La bona besteto tion faris kaj la infanoj transveturis feliĉe. Kiam ili iris iom da tempo, la arbaro ŝajnis al ili pli kaj pli konata, kaj fine ili ekvidis de malproksime la patran domon. Ili ekkuris galope, sin ĵetis en la ĉambron kaj falis sur la patran bruston. De la tempo, kiam la lignohakisto forlasis la infanojn en la arbaro, li ne ĝuis eĉ unu trankvilan tagon; la duonpatrino mortis. Grenjo malplenigis sian antaŭtukon kaj la disŝutitaj perloj kaj multekostaj ŝtonoj saltis en la ĉambro; Haĉjo ĵetis el sia poŝo unu plenmanon post alia. La mizero finiĝis kaj ili ĝoje vivis kune.

Finita estas la fabelo,
jen muso kuras en bela felo;
kaptu ĝin en sakon
kaj el la felo faru jakon.



La fabelo devenas de fabelo-kolekto de la konataj fratoj Grimm. Ĝi estas tradukita de Kazimierz Bein (1872-1959), fama Esperanto-pioniro kaj tradukinto.

Oni kelkloke povas senti ke la lingvaĵo de la traduko estas iom arhaika. Do, tio pravas ke ankaŭ Esperanto evoluis.

Vera vira amiko

Viroj ne kutimas malkaŝi sin inter si, sed en vira kongreso, kiun mi ĉeestis tio fakte okazis. Kiam la preleganto petis nin promeni kvarope dum horo, rakontante unu al la aliaj pri siaj plej grandaj doloroj en la nuna vivo, tio ne ŝajnis aparte problema afero. Huŝonte nin li menciis ke eble manko de vera vira amiko povas esti tia problemo, kiun viroj ofte prisiilentas. Huŝ!

Ni iom ridis pro la "huŝ", tiel malsimila al la militista "disiru"! La ridon sekvis longa silento, kiam nia kvaropo komencis sian promenon en la printempa ĉirkaŭkongreseja parko. Unu ulo per tremeta voĉo veis ke vere mankas amikoj, ĉar la propraj malaperis post interurba translokiĝo. Nun estas nur laborkompanoj kaj edzoj de la amikinoj de la edzino. La dua eĉ konfesis ke tute mankis amikoj, kaj eĉ larmoj videblis en liaj okuloj. Verŝajne pro tio ankaŭ lia voĉo tremetis. La tria seke sed tamen tremete konstatis ke amikeco eble apartenas al la juneco, ĉar al mezaĝulo mankas la tempo, sed tamen estus agrable... Tiam estis mia vico. Mi diris ke mi estas feliĉa, ĉar amikojn mi havas, eĉ kelkajn.

Tamen – mi aldonis – ankaŭ al mi mankas tempo por vere renkonti ilin. Fakte nek surface nek kerne mi veis. Mi eĉ komprenis ke min favoris la sorto, kaj ke mi devus esti feliĉa. Min tamen iom ŝokis ke la tri ceteraj uloj estis tiel facile impresitaj.

Reventinte hejmen mi plurfoje pensis pri la interparolo. Kiom ofte mi fakte renkontas la amikojn? Ĉiudecembre mi iun forstrekas el la listo de ricevantoj de kristnaskaj poŝtkartoj. Tiujn mi forstrekas, kiuj ne dum la du antaŭaj decembroj sendis kartojn. Pli ol ĉiu dua adreso nun forstrekis. La forstrekado mem estas doloriga afero, ĉar ĝi memorigas min pri la infanaj, knabaj kaj studentaj jaroj, kiam amikoj multis. Kiam mi renkontas iun amikon studentan surstrate, ni ofte salutas kaj konstatas ke ni iam devus renkontiĝi. Post tio ni rapide disiras.

La sekvan vesperon survoje al butikoj por aĉeti gazeton mi renkontis Rikardon. Li estis unu el tiuj, kun kiuj mi kelkfoje interkonsentis ke ni devus... Nun li tamen ne ŝajnis hasti. Li salutis kaj ne nur tion. Li eĉ komencis rakonti pri la forpaso de

sia onklo, en kies ĝardeno ni antaŭ dudek jaroj tendumis petolante. Ne, mi eĉ hontas pri tio, kion ni faris. Mi ĉiam hontetas renkontante Rikardon, kaj mi ne volas paroli pri tio. Tial mi eĉ evitas lin. Sed ŝajnas ke li vere volas paroli kun mi. Mi rakontis pri miaj edzino kaj gefiloj, kiuj ĝuste nun forestas feriante. Fakte, Rikardo estis mia plej proksima amiko antaŭ dudek jaroj. Ĝuste tial ni iom petolis. "Sango bolas, juneco petolas." Eble mi forgesu pri tio. Ŝajnas ke Rikardo volas denove amikiĝi mezaĝe. Kial ne? Li demandas ĉu li rajtas viziti min. Do bone, morgaŭ vespere. Mia familio forvojaĝis por viziti miajn bogepatrojn kaj li neniam edziĝis. Do, estos nur ni. Du malnovaj amikoj. Eble ni povos iom petoli kvankam mezaĝaj. Mi tre ĝojas. Mi vere atendos.

Nova tago. Per kio mi regalu la gaston? Magazine mi aĉetis bieron, ne viskion. Oni ne troigu. Mi ŝanĝis ĉemizon. Kravato? Ne. Oni ne troigu. Rikardo sonorigis ĉe la pordo. Mi malfermis. Li eniris, ni salutis. Li demetis la vestaĵojn. Ni sidiĝis en la salono, ekbabilante pri okazaĵoj dum la pasintaj jaroj, sed ne pri la tendumado ĉe la onklo. Kial Rikardo ne edziĝis? Li volis esti libera, ne pensi pri infanoj. K.t.p., k.t.p. Mi iom rakontis pri mia vivo, pri la laboro en papera industrio, ĉe granda maŝino kiu produktas paperon por gazetoj.

Subite Rikardo diris:

"Ĉu vi eble volus perlabori iom pli? Mi estas reprezentanto de Purfix, kiu vendas higienajn preparatojn. Mi povus aranĝi ke ankaŭ vi..."

La ceteron mi ne aŭdis, kvankam Rikardo fervore parolos pri ĉiuj avantaĝoj de Purfix.

Mi aŭdis pri Purfix antaŭe. Se iu reprezentanto sukcesas varbi alian, li ricevas parton de lia gajno. Tiel kreiĝas tuta reto da reprezentantoj, kiuj entuziasme provas engaĝigi aliajn.

Kiam mi fermis la pordon post la foriro de Rikardo, mi sentis larmojn en miaj okuloj, kaj nun ankaŭ mia gorĝo tremetis.

Kirasulo

La predikanto pripensas la vivŝanĝiĝojn

1 Por ĉio estas sezono, kaj tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno;

2 estas tempo por naskiĝi, kaj tempo por morti; estas tempo por planti, kaj tempo por elŝiri la plantitaĵojn;

3 estas tempo por mortigi, kaj tempo por kuraci; estas tempo por detrui, kaj tempo por konstrui;

4 estas tempo por plori, kaj tempo por ridi; estas tempo por ĝemi, kaj tempo por danci;

5 estas tempo por disĵeti ŝtonojn, kaj tempo por kolekti ŝtonojn; estas tempo por ĉirkaŭbraki, kaj tempo por foriri de ĉirkaŭbrakado;

6 estas tempo por serĉi, kaj tempo por perdi; estas tempo por konservi, kaj tempo por forĵeti;

7 estas tempo por disŝiri, kaj tempo por kunkudri; estas tempo por silenti, kaj tempo por paroli;

8 estas tempo por ami, kaj tempo por malami; estas tempo por milito, kaj tempo por paco.

9 Kian profiton havas faranto de tio, kion li laboras?

10 Mi vidis la penemecon, kiun Dio donis al la homidoj, por ke ili turmentiĝu per ĝi.

11 Ĉion Li kreis bela ĝiatempe; kaj scion pri la mondo Li enmetis en ilian koron, sed tiel, ke homo ne povas kompreni la farojn, kiujn faris Dio de la komenco ĝis la fino.

12 Mi scias, ke ekzistas nenia bono por ili, krom ĝoji kaj fari bonon en sia vivo.

13 Kaj se homo manĝas kaj trinkas kaj ĝuas bonon de sia tuta laborado, tio estas dono de Dio.

14 Mi scias, ke ĉio, kion faras Dio, restas eterne; al ĝi oni nenion povas aldoni, kaj de ĝi oni nenion povas depreni; kaj Dio tion faris, ke oni Lin timu.

15 Kio fariĝis, tio ekzistas de longe; kaj kio estas fariĝonta, tio antaŭ longe jam estis, kaj Dio revokas pasintaĵojn.

El "La Predikanto 3"
Tradukis L.L. Zamenhof

ANEKDOTOJ

La plej malbona panjo

Kruko eniras la salonon kaj vidas Joĉjon kiu paŭtegas.

Kruko demandas al Jozefino: Kio estas ĉe Joĉjo? Kial li mismienas?

Jozefino: Ŝajnas ke mi estas la plej malbona panjo en la tuta mondo.

Kruko: Ho, mi bedaŭras ke li pensas tion.

Jozefino: Ne, ne, estas eĉ bone. Pasintan semajnon mi estis la plej malbona panjo en la tuta universo. Do mi tamen progresas.

Gajni monon

Baniko: Mi nun certe gajnos multege da mono!

Kruko: Kiel?

Baniko: Vidu, mi ĵus aĉetis ĉi tiun libron: "Kiel gajni monon verkante libron pri kiel gajni monon".

Sekura amikeco

Kruko parolas kun Baniko: Banĉjo, vi estas mia plej bona amiko.

Baniko estas embarasita: Hm, hm....

Kruko: ĉu vi volas scii kial?

Baniko: 'S ja.*

Kruko: Estas ĉar mi povas diri al vi aferojn kiujn mi neniam dirus al mi edzino.... Kaj ankaŭ vi ne!

* 'S = "estas". Ne temas pri oficila Esperanta vorto sed pri misprononco en rapida parolo. Tio okazas en ĉiuj lingvoj

Ofica malsano

Mi suferas pro ofica malsano. Jenas ĝiaj simptomoj:

* antaŭ tagmanĝo mi volas manĝi

* post tagmanĝo mi volas dormi

* daŭre ŝajnas, ke oni pagas tro malmulte!

Interpunkcio

Kruko denove provas amindumi la belan Jasminon.

Sed la junulino kolere krias: Lasu min trankvila! Mi neniam rendevuos kun vi! Punkto fino!

Kruko pripensas tion dum kelkaj sekundoj, kaj respondas: Sed kial ne? Demandosigno.

Kia ŝanco

Baniko demandas al Kruko: Kia estis via rendevuo hieraŭ vespere kun tiu nova ino?

Kruko grumbas: ĝi ne okazis!

Baniko: Ĉu? Kial, do?

Kruko: Ŝi havis aŭtoakcidenton.

Baniko: Ho, ĉu ŝi vundiĝis?

Kruko: Ne, ne, ŝi estas komplete en ordo. Sed ŝi ne povis veni al la rendevuo.

Kruko pripensas dum unu-du sekundojn, kaj diras: Mi ĉiam havas tian misŝancon!

Fumanto

Baniko akceptiĝas en malsanulejon.

Flegistino: Ĉu vi fumas?

Baniko: Ne.

Flegistino: Ĉu vi iam fumis?

Baniko: Jes.

Flegistino: Kaj kiom da cigaredoj ĉu vi fumis ĉiutage?

Baniko: Aaa, tri... Ne, kvin... Pako.

Flegistino: Kaj kiam vi ĉesigis fumi?

Baniko: Aaa... hieraŭ...

Flegistino: Vi ankoraŭ fumas, ĉu ne?

Baniko: Jes.

Nova Mercedes

Kvindekjara knabo alvenis hejmen kun nova Mercedes aŭto kaj liaj gepatroj kriis:

"Kie vi akiris tiun aŭton!!!?"

Trankvile li respondis, "Mi aĉetis ĝin hodiaŭ."

"Kun kiu mono?" postulis iliaj gepatroj. "Kiom vi pagis?"

"Ĝi pagigis min nur 15 dolarojn," la knabo diris.

Do, la gepatroj komencis kriegi eĉ pli laŭte. "Kiu vendus tian aŭton kontraŭ 15 dolaroj?"

"Estis la sinjorino proksime en nia strato," respondis la knabo. "Mi ne scias ŝian nomon ĉar ili nur lastatempe ekloĝis tie. Ŝi vidis min preterpasante per mia biciklo kaj demandis min ĉu mi volus aĉeti Mercedes-on kontraŭ 15 dolaroj."

"Ho ve!" ĝemis la patrino. "Ŝi devas esti molestanto de infanoj. Kiu sciis kion ŝi farus venontfoje? Johano, venu rekte tien kaj malkovru tion kio okazas!"

Do, la patro de la knabo rekte iris al la domo kie loĝis la virino. Li postulis ke ŝi klarigu kial ŝi vendis novan Mercedes-on je 15 dolaroj al lia filo.

"Nu," respondis ŝi, "ĉimatene mi ricevis telefonvokon de mia edzo. Mi kredis ke li estis for pri komerca

veturo, sed li informis min ke li estis en Havajo kun sia koramikino, kaj ke li intencis neniam reveni al mi. Li diris ke li estas embarasata kaj bezonas monon, kaj do petis min vendi lian novan Mercedes-on kaj sendi la ricevotan monon al li. Do tion mi faris."

Koncerne humuro, normoj ne ekzistas - neniu povas diri kion estas bona aŭ malbona, kvankam oni povas certigi ke ĉiu diros tiel.

John Kenneth Galbraith

Tiuj ĉi anekdotoj aperis interrete en liberaj-anekdotoj@yahoo.com



Konfido

"Avino, ĉu vi havas fortajn dentojn?"

"Ne, mia malgranda amiko, bedaŭrinde mi ne havas eĉ unu denton."

"Estas bone. Volu do kaŝi miajn nuksojn, ĝis mi revenos"

Malkonsento

Sinjorino Y. skribas leteron al sia amikino. Dum la skribado ŝi rimarkas, ke Evelin legas la leteron post ŝia dorso. Ŝi daŭrigas skribante:

"Mi volus al vi skribi ankaŭ sekreton, sed mi nun ne povas, ĉar Evelin staras malantaŭ mi kaj legas mian leteron."

Evelin kolere diras:

--Tio ĉi ne estas vera; --mi ne legas vian skribaĵon.

La du laste cititaj anekdotoj aperis en la klasika Esperanto-revuo Lingvo Internacia.

La Espero volonte akceptas aliajn anekdotojn de la legantoj.

Eble tradukado de anekdotoj povus esti bona tasko por via studrondo.

Stora Tuna välkomnar nästa års svenska esperantokongress

Stora Tuna och Borlänge är sedan många år sammanslagna till en kommun, och det är alltså till Borlänge vi åker för att kongressa i Kristi himmelsfärds-helgen 2009. Men det är i Tunabygdens hjärta Fornby folkhögskola ligger. SEF-styrelsen har sammanträtt där och konstaterat att både kongresslokaler, boende och mat väl motsvarar våra önskemål.

Även denna sydligare del av Dalarna är mycket naturskön. Dessutom gör vi en heldagsutflykt till Falu koppargruva, Siljansbygden och Dalhalla. Om kulturarvet i övrigt påminner namn som Johan Olof Wallin, släkten Björling med operasångare och jazzmusiker, Putte Wickman, Lars Roos. Eller minns ni sångerskan Lilly Berglund? Reservera alltså 22-24 maj för SEF-kongressen. Eller res redan den 21 maj för att hinna till heldagsutflykten morgonen efter.

Detaljer om tider, priser, program och om utflykten kommer i nästa La Espero.

Universala Kongreso de Esperanto i Bjälystok den 25 juni-1 augusti 2009

Anmälningsavgifter (svenska kronor)

	/12-09	-31/3-09	1/4-09-
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1540	1920	2305
2. Icke direkt medlem i UEA	1920	2400	2880
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 79-01-01 och 88-12-31), som är medlem i UEA	770	960	1150
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1150	1440	1730

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 88-12-31 betalar ingen kongressavgift. Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152

Eftersom kurserna är så osäkra kan avgifterna komma att justeras.

Äntligen i ny upplaga:



Esperanto! Nyckel till det internationella språket har kommit i en ny upplaga. 15 x 10,5 cm. 48 s. Beställ flera till klubben eller för att ge bort till julklapp, 2 ex, 40 kr; 5 ex, 100 kr; 12 ex, 220 kr; 25 ex, 375 kr; 50 ex, 600 kr; 150 ex, 1200 kr.

Dessa priser inkl. porto.
Esperantoförlaget, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, eldona@telia.com, 031 - 12 05 94
Information om andra böcker:
www.algonet.se/~eldona

Present- eller julklappstips

Nu finns det muggar med "pratbubblan" på två sidor, så att både vänster- och högerhänta visar den utåt när de dricker.

De har sålts vid Esperantokongressen i Göteborg och finns nu till försäljning både hos och hos Esperanto-Centro i Stockholm.

Varför inte köpa en mugg till dig själv, att ha på jobbet eller hemma, så att du kan få prata om esperanto varje gång du fikar tillsammans med någon. Det är en jättebra och billig present. Vi kan också utse den till årets julklapp.

Pris 48,- kr per styck vid besök på Esperanto-Centro i Stockholm.
Två muggar inkl porto kostar 150,- kr.
Fem muggar inkl porto kostar 350,- kr

libroservo@esperanto.se eller
Post till Esperanto-Centro eller
per tel 08-340800.

Bliv medlem i UEA 2009

Universala Esperanto-Asocio är den största organisationen i världen för esperantister. Den behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- sprida esperanto
- verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang

- underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt

- därmed öka förståelsen mellan folk och länder UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto, har en omfattande bokförsäljning och anordnar varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och, om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Information: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152

Avgifterna för år 2009 är följande:
MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto.

550 kr
MJ Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan! 220kr

MG Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift. 90 kr

SZ Avgift för Societo Zamenhof särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA. 1 100 kr

PT Patrono de TEJO, får tidningen Kontakto 660 kr

DM Dumviva membro betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto 13 750 kr

DMJ Dumviva membro kun jarlibro betalar för hela livet. Får årsboken 5 500 kr

Dpat Dumviva Patrono, betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och Blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof". 137 500 kr

DPT Dumviva Patrono de TEJO betalar för hela livet och får tidningen Kontakto. 16 500 kr